

MI ESTAS LA REVIVIĜO KAJ LA VIVO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 11,1-45

En tiu tempo malsaniĝis homo nomata Lazaro, el Betania, la vilaĝo de Maria kaj de ŝia fratino Marta. Maria estis tiu, kiu ŝmiris la Sinjoron per parfumo kaj viŝis liajn piedojn per sia hararo; la malsanulo estis ŝia frato. La fratinoj sendis anoncon al Jesuo: „Sinjoro, tiu kiun Vi amas, estas malsana.”

Jesuo, aŭdinte tion, diris: „Ĉi tiu malsano ne estas mortiga; sed ĝi montros la gloran povon de Dio kaj de lia Filo. “ Jesuo amis Martan, ŝian fratinn Marian kaj Lazaron. Kiam Li sciigis, ke Lazaro estas malsana, Li atendis ankoraŭ du tagojn en la loko, kie Li troviĝis; poste Li diris al la disĉiploj: „Ni reiru en Judeon.” La disĉiploj rimarkigis: „Majstro, la Judoj ĵus celis mortigi Vin, kaj ĉu Vi denove iras tien?”

Respondis Jesuo: „Ĉu ne estas dek du horoj en la tago? Se iu iras en la tago, li ne stumblas, ĉar li havas la lumon. Sed se iu iras en la nokto, li stumblas, ĉar mankas al li la lumo.” Poste Li aldonis: „Nia amiko Lazaro endormiĝis; sed Mi iras vekti lin.” La disĉiploj diris: „Sinjoro, se li endormiĝis, li resaniĝos.” Jesuo parolis pri la morto de Lazaro; sed ili supozis, ke Li parolas pri la dorma ripozo. Tiam Jesuo diris al ili klare: „Lazaro jam mortis. Kaj Mi ĝojas pro vi, ke ni ne estis tie, ĉar tiel vi kredos. Tamen ni iru al li.” Tiam Tomaso, nomata Didimo, diris al siaj kundisĉiploj: „Ni ankaŭ iru, por ke ni mortu kun li.”

Betania estis proksime de Jerusalemo, en la distanco de ĉirkaŭ dek kvin stadioj. Kaj multaj Judoj iris al Marta kaj Maria por konsoli ilin pri ilia frato. Kiam Jesuo alvenis, Lazaro jam kvar tagojn estis entombigita. Tuj, kiam Marta eksciis, ke Jesuo alproksimiĝas, ŝi iris al Li renkonte; dum Maria restis en la domo. Tiam diris Marta al

Jesuso: „Sinjoro, se Vi estus ĉi tie, mia frato ne estus mortinta! Tamen ankaŭ nun mi scias, ke kion ajn Vi petos de Dio, tion Dio donos al Vi.” Jesuo diris al ŝi: „Via frato reviviĝos.” Marta respondis: „Jes, li reviviĝos en la lasta tago.” Jesuo diris al ŝi: „Mi estas la reviviĝo kaj la vivo. Kiu kredas je Mi, eĉ se li mortus, vivos; eĉ, ĉiu kiu vivas kaj kredas je Mi, ne mortos poreterne. Ĉu vi tion kredas?” Kaj ŝi respondis: „Jes, Sinjoro, mi kredas ke Vi estas la Mesio, la Filo de Dio, kiu venas en la mondon.”

Kaj dirinte tion ŝi foriris, kaj vokis sekrete sian fratino Maria: „La Majstro ĉeestas kaj vokas vin.” Aŭdinte tion, Maria leviĝis rapide kaj iris al Li. Jesuo ankoraŭ ne eniris en la vilaĝon, sed estis en la loko, kie Marta Lin renkontis. La Judoj, kiuj estis kun Maria en la domo por ŝin konsoli, vidante ke ŝi leviĝis subite kaj eliris, sekvis ŝin, opiniante ke ŝi iras al la tombo por plori tie.

Kiam Maria alvenis al la loko kie Jesuo estis, kaj Lin ekvidis, ŝi falis antaŭ liaj piedoj kaj diris: „Sinjoro, se Vi estus ĉi tie, mia frato ne estus mortinta!” Kiam Jesuo vidis ŝin ploranta, kaj ankaŭ la Judojn, kiuj venis kun ŝi, plorantaj, Li profunde emociiĝis kaj demandis: „Kie vi lin metis?” Ili diris al Li: „Sinjoro, venu kaj vidu.” Jesuo ploris. La Judoj do diris: „Jen kiel Li lin amis!” Sed kelkaj diris: „Ĉu Li, kiu malfermis la okulojn de la blindulo, ne povis kaŭzi, ke ankaŭ tiu ne mortu?”

Tiam Jesuo denove emociiĝis kaj venis al la tombo. Ĝi estis groto kun ŝtono antaŭ la enirejo. Jesuo diris: „Forigu la ŝtonon.” Marta, la fratino de la mortinto, diris al Li: „Sinjoro, li jam malbonodoras, ĉar li estis tie jam kvar tagojn.” Sed Jesuo diris al ŝi: „Ĉu Mi ne diris al vi, ke se vi kredos, vi vidos la gloron de Dio?” Oni forigis la ŝtonon. Jesuo levis siajn okulojn kaj diris: „Patro, Mi dankas al Vi, ĉar Vi elaŭdis Min. Mi ja scias, ke Vi ĉiam elaŭdas Min; sed pro la ĉirkaŭstaranta homamaso Mi tion diris, por ke ili kredu, ke Vi Min sendis.” Dirinte tion, Li laŭte vokis: „Lazaro, elvenu!” La mortinto mortinto elvenis, kun la manoj kaj piedoj ligitaj per tombotukoj, kaj la vizaĝo ĉirkaŭligita per viŝtuko. Jesuo diris: „Malligu lin kaj lasu lin iri.” Multaj el la Judoj, kiuj venis al Maria kaj vidis, kion Jesuo faris, ekkredis je Li.

La bona novaĵo portita de Jesuo estas ke la morto, ne nur ne interrompas la vivon, sed estas tiu kiu permesas al ĝi flori en novan, plenan kaj difinitivan formon. Estas tio kion eldiras Johano en sia evangelio per iu epizodo kiu estas ekskluziva de tiu ĉi evangeliisto, tiu de la resurekto de Lazaro, je ĉapitro 11.

Lazaro, disĉiplo de Jesuo, malbonfartas, mortas kaj, kiam Jesuo alvenas, li jam estas en la tombo. Ni vidu kiel la evangeliisto prezentas la renkontiĝon de Jesuo kun la komunumo reprezentata de la fratinoj. Nu, la unua reago de unu el la fratinoj, Marta, estas riproĉo al li. Li sendigis iun diri al Jesuo ke Lazaro estis malsana kaj Jesuo ne moviĝis.

Do la unua reago estas riproĉa, *"Sinjoro, se Vi estus ĉi tie, mia frato ne estus mortinta! Tamen ankaŭ nun mi scias..."* ŝi referencas al tio kion ŝi scias, de la tradicio, *"... ke kion ajn Vi petos de Dio, tion Dio donos al Vi."* Por kompreni la tutan dinamikon de tiu dialogo oni devas tion scii: la verbo peti indikas la peton de tiu malsuperulo al iu superulo, dum kiam temas pri peto inter samniveluloj, oni uzas la verbon 'demandi'. Ŝi do pensas ke Jesuo estas malsupera al Dio, ŝi ne komprenis ke en Jesuo manifestiĝas la plenecon de Dio.

Jesuo respondas al ŝi: *"„Via frato reviviĝos."* kaj Marta replikas agacita: *"„Jes, li reviviĝos en la lasta tago."* Ŝi kredas ke la resurekto estu je la fino de la tempoj kaj do tio ne donas konsolon aŭ komforton al tiu kiu priploras amatan personon. Kaj jen – gravas tiu versiklo – ke Jesuo ŝanĝas radikale la koncepton pri vivo, la koncepton pri morto kaj la koncepton pri resurekto.

"Jesuo diris al ŝi: "Mi estas", 'mi estas' estas la dia nomo, sed ĝi estas je la prezenco,, li ne diras 'mi estos'. "mi estas la reviviĝo". La reviviĝo ne estos iam estonte, kiel kredas Marta, sed estas nuna kun Jesuo, ĉar Jesuo diras: "Mi estas la reviviĝo kaj la vivo". Jesuo estas la reviviĝo kaj la vivo. Kaj poste, jen la grava deklaro de Jesuo pri la vivo kaj la morto. " Kiu kredas je Mi, eĉ se li mortus, vivos".

Do iu disĉiplo, kiel Lazaro, kiu aliĝis al Jesuo, ankaŭ se nun li estas mortinta, li daŭre vivas. Do, kiu kredas ankaŭ se li mortas, vivos. Kaj poste,

sin adresante al la komunumo, kiu, male, estas vivanta, Jesuo deklaras: "Ĉiu kiu vivas kaj kredas je Mi" do tiuj kiuj aliĝis al li, "ne mortos poreterne".

Jesuo venas por ŝanĝi la koncepton de la vivo kaj de la morto. La Sinjoro ne revivigas la mortintojn, sed donas al vivantoj vivon kapabla superi la morton. La eterna vivo ne plu estas espero por la estonto, sed certeco por la nuntempo. Do, antaŭ tiu radikala ŝanĝo de la vivo kaj de la morto, Jesuo demandas al Marta: "Ĉu vi kredas tion?", tio estas, ĉu vi kredas ke tiu kiu aliĝas al mi havas vivon kapabla superi la morton?

"Kaj Marta respondas: „Jes, Sinjoro, mi kredas“. Nun ŝi finfine ne scias, sed kredas kaj aliĝas," ke Vi estas la Mesio" – estis la ekskomuniko por tiuj kiuj rekonis en Jesuo la Mesion - "la Filo de Dio, kiu venas en la mondon." Diriinte tiujn vortojn, ŝi iras voki Maria-n, kaŝe. Kial kaŝe? Ĝis kiam la komunumo kredas ke Jesuo estas iu profeto, iu sendito de Dio, li ĝuas la simpatian de la popolo, ankaŭ de la ĉefoj. Sed, kiam oni rekonas ke Jesuo estas la Mesio, tiam komenciĝas la problemoj.

Nu, Jesuo – asertas la evangeliisto – "Jesuo ankoraŭ ne eniris en la vilaĝon", la vilaĝo estas ĉiam la loko de la tradicio, kiu malfacile akceptas la novaĵon portitan de Jesuo kaj, en tiu ĉi vilaĝo, estas male la Judoj, la estroj de la popolo, kiu faras la funebran kordonon al la fratinoj de Lazaro pro la morto de la frato. Kaj je tiu ĉi punkto endas distingi inter du grekaj verboj, inter 'plori' kaj 'singulti'.

La fratinoj kaj la Judoj ploras kaj la plorado signifas senesperon pro io kio ne plu estas. Nu Jesuo, vidante ĉion tion, ĉi tie oni tradukas per 'profunde kortuŝiĝis'. Li ne kortuŝiĝis, la verbo indikas 'spirblovi', Jesuo vibras ĉar li vidas ke lia komunumo pensas ekzakte kiel liaj malamiko, la Judoj. Ili ne komprenis la novaĵon kiun li jam diradis, ke la vivo kiun li komunikas kapablas superi la morton.

Jesuo kam diris al ili: "Kiu sekvas mian vorton neniam mortos", sed li ne estis ankoraŭ komprenata. Do, "Tre malkvieta, li demandis: "Kien vi lin metis?" Tio estas, estas vi kiuj lin metis ien. Kaj Jesuo ne 'ekploris' sed larmis. La evangeliisto distingas la ploradon de la Judoj kaj de la fratinoj, kiu estas ploro de senespero, kaj la larmadon de Jeso kiu estas esprimo de doloro.

Tiam Jesuo, ĉiam vibrante, aliras la tombon – ĝi estis groto – "kun ŝtono antaŭ la enirejo". Ni ĉiuj konas la diraĵon "surmeti ŝtonon", kio signifas

ke ĉio finiĝis. Jes, oni reviviĝas en la lasta tago, sed tio certe ne estas espero. Kaj ĉi tie estas tri verboj imperativaj kiuj Jesuo ordonas al sia komunumo kaj estas "forpreni", "malligi" kaj "lasi".

La unua "*Forigu la ŝtonon.*" Estas vi kiuj metis tiun ŝtonon kiu malhelpas la komunikadon inter la mortintojn kaj la vivantojn. "*Marta, la fratino de la mortinto, diris al Li*" Strangas ke la evangeliisto memorigas al ni ke Marta estas la fratino de la mortinto kaj ne de Lazaro, ĉar estas la ideo de la morto kiu dominas tiun ĉi komunumon. "*Sinjoro, li jam malbonodoras*". La morton oni konsideris reala, difinitiva je la tria tago, kiam komenciĝis jam ne reversebla la putriĝo de la kadavro.

Do en la kvara tago la kadavro jam putrida kaj la efiko de la morto estas la malbonodoro. "*Li estis tie jam kvar tagojn.*" *Sed Jesuo diris al ŝi: „Ĉu Mi ne diris al vi, ke se vi kredos, vi vidos la gloron de Dio?”* Sed Jesuo kiam li demandis al Marta ĉu ŝi kredas li demandis "ĉu vi kredas ke kiu vivas kaj kredas ne mortas?". Nun Jesuo male diras: "Se vi kredos, vi vidos la gloron de Dio".

Kion tio volas indiki? Ke per la per nedetruenda vivo, kapabla superi la morton, manifestiĝas la gloro de Dio. La gloro de Dio estas vivo kapabla superi la morton. "*Oni forigis la ŝtonon*" kaj la vorto ŝtono aperas la trian fojon, "*Jesuo laŭte vokis: „Lazaro, elvenu!*" , ĉar la regno de la mortintoj ne estas la loko por disĉiplo de Jesuo. Kiu aliĝis al Jesuo, tiu havas la spiriton, kaj la spirito estas vivo. Kaj tie kie estas la vivo, ne povas esti la morto.

Sed, strange, dum Jesuo vokis Lazaron, skribas la evangeliisto, "*La mortinto elvenis,*". Do ĉi tie estas problemo. Se li estas mortinta li ne povas eliri, se li vivas ne plu estas mortinta. Kial la evangeliisto diras ka la mortinto eliris? Kaj eĉ diras: "*la manoj kaj piedoj ligitaj per tombotuko*". Unu el la bildoj por indiki la morton, kaj ĝin ni trovas en la psalmo 116 "*kunpremismin la ŝnuro de la morto*". Estas la komunumo kiu devas ŝanĝi la bildon de la morton kaj de la reviviĝo. Por ili Lazaro estas mortinta kaj tiu mortinto devas eliri de la tombo por permesi poste al Lazaro ĉeesti en la komunumo.

Estas ili kiuj lin ligis per la ŝnuroj de la morto, konsiderante la morton kiel nerenversebla okazaĵo. Kaj jen do la la ordono de Jesuo: "*Malligu lin*" , malligante la mortinton estas la komunumo kiu malligiĝas de la timo pro la morto. Kaj la lasta stranga ordono de Jesuo, ne diras "ni iru renkonte al li, ni

lin akceptu, ni lin venigos". Inter alie Lazaro poste malaperas kaj diras eĉ ne unu vorton kaj al Jesuo kaj al siaj fratinoj. "*Lasu lin iri.*"

Sed kien devas iri Lazaro? Aŭ pli bone, kien devas iri la mortinto? Li devas daŭrigi la iradon al la Patro. La verbo `iri' en la evangelio de Johano estas utiligata por Jesuo por indiki lian itineron al la Patro. Kion do volas diri la evangeliisto pere de tiuj bildoj? Ke estas la komunumo kiu devas liberiĝi de la ideo de la morto kiel fino de la persono, ĉar, ĝis kiam oni priploras personon kiel mortintan, ne eblas ĝin esperinti kiel vivanta. Oni devas do malligi la mortinton, lasi lin iri al la Patro, kie Lazaro jam estas, viva, vivanta pli ol ĉiam antaŭe.